

ILEI ĉe UNESCO :

**37a Ĝenerala Konferenco de UNESCO en Parizo
5an ĝis 20an de novembro 2013**

ILEI havas ĉe UNESCO tri kutimajn delegitojn. Temas pri
Sinjorino Renée Triolle
Sinjorino Monique Arnaud
Sinjoro Jean-Pierre Boulet
Plie iris al Parizo la prezidanto de ILEI Mireille Grosjean
Ilia statuso estas observantoj.

Tia deĵorado nomiĝas lobiado. « loby » en la angla signifas koridoro. Estas fakto, ke la delegitoj povas en la koridoroj abunde diskuti kun iuj diplomatoj de membroŝtatoj, kun iuj delegitoj de aliaj NeRegistaraj Organizoj (NRO), kun iuj kunlaborantoj de UNESCO. Per tiaj kontaktoj ili povas prezenti Esperanton, informi pri la agadoj de ni ĉiuj, ĉu de UEA, ĉu de ILEI, ĉu de diversaj aktoroj de nia movado.

Povas esti okazo ion prezenti, ion diri en iu kunsido, partopreni en laborgrupo. Tio povas okazi tra la tuta jaro, ĉar ĉe UNESCO okazas multe ekster tiu tre grava Konferenco, kiu okazadas ĉiun duan jaron.

Mireille Grosjean
Prez. de ILEI